KIEL ESTIĜIS LA FLAGO DE EŬROPA UNIO?

Koncizan kaj klaran eksplikon alportis en la 26-a de aŭgusto 1998 gazeto Die Welt, el kiu ni citas:

„Historio de la flago komenciĝas jam dum dua mondmilito. Paul Lévi, belga judo, observis tiam kun angoro en Leuven en Belgio oftajn trajnojn, per kiuj germana Gestapo veturigis judojn al Oriento en necertacan estontecon. Li ekintencis, se li transvivos la militon kaj maziismon, li konvertiĝos al katolikismo. Li transvivis kaj katolikiĝis.

En la 5-a de majo 1949 estis en Londono fondita Konsilio de Eŭropo kaj Paul Lévi estis nomumita estro de ĝia kultura fako. Ses jarojn pli poste, en la jaro 1955, diskutis reprezentantoj en Konsilio de Eŭropo pri komuna flago. Ĉiuj proponoj enhavis – eble laŭ skandinavia modelo – krucon. Socialistoj ilin rifuzis kiel tro ligitaj al ideologio, kiel tro kristanecajn.

Foje promenante ekvidis Lévi statuon de Virgulino Maria kun krono el oraj steloj ĉirkaŭ la kapo. En la sunlumo ili belege brilis sur fono de la blua firmamento. Lévi poste vizitis grafon Benvenuti, kristan-demoktraton el Venecio kaj tiaman ĝeneralan sekretarion de la Konsilio de Eŭropo. Li proponis al li dek du orajn stelojn sur la brua fono kiel motivon de la aŭropa flago. Benvenuti estis per tio entuziasmita. Mallonge post tio la propono estis aprobita...“ ■

Die Welt, 26.8.1998